

# L'esperanto

Revu de Itala Esperanto-Federacio

Rivista inviata in abbonamento agli associati FEI (vedasi p.2)  
Prezzo di un singolo numero 2 € per l'Italia 3 € per l'Estero

## Pretigu pacon se vi volas pacon

Renato Corsetti  
*pagina 3*

## Incontro di studio su Bicknell

Ermigi Rodari  
*pagina 5*

## Kunveno pri Giorgio Canuto

J. Sigmond - F. Franceschi  
*pagina 7*

## Esperanto-ludoj

Daniele Binaghi  
*pagina 8*

## De kozo naskiĝas kozo

Renato Corsetti  
*pagina 10*

## Historio de E-Muziko (3)

Floréal Martorell  
*pagina 11*

## Agotago a Milano e Bologna

Vari  
*pagina 16*

## Nova Sento

Manuela Ronco  
*pagina 21*



ISSN 1974-9147

01006



9 771974 914006



Niccolò Fabi tra  
i premiati di Ancona

## ENKONDUKO

Alia jaro pasis kaj ĝi estis signita de la forpaso de du grandaj samideanoj kiuj tre multe faris por la antaŭenigo de nia Movado, Umberto Broccatelli kaj Mauro La Torre. La unua estis ankaŭ longe redaktoro de ĉi tiu revuo. Espereble inter la gejunuloj, novaj esperantiĝintoj, jam estas iliaj anstataŭantoj. Dum la eventuala atendo ni povas nur engaĝiĝi pli forte por klopodi ŝtopi la truojn lasitajn de ili, ĉiu por sia fako. Kaj eĉ sen fako ni povas multon fari, ekzemple kunlabori kun la lokaj kluboj por agotagoj aŭ eventualaj varbadoj. Kaj ne kredu ke se vi estas izolita asociano vi povas nenion fari. Ekzemple vi povus dum eventualaj foiroj en viaj urboj, organizi budon kaj peti de Italaj Esperantistoj, tiel ke eventualaj samideanoj pretu helpi, kontraŭ gastigo, zorgi pri la budo.

Pri la enteno de ĉi tiu numero, vi povos legi kronikon de la jam tradiciaj premioj dediĉitaj al Zamenhof kaj Stoppoloni. Krome vi legos ankaŭ pri kunvenoj dediĉitaj al pioniro de la Movado kiel Bicknell kaj al alia korifeo de itala kaj internacia Movado, kiel Giorgio Canuto (iama prezidanto de UEA). Krom tio estas la jam kutimaj rubrikoj pri interreto/komputiloj kaj lingvo, kaj alia parto de Historio de Muziko en nia Movado.

Nu, esperante ke legado amuzu vin, mi deziras fruktodonan novan jaron.

Pier Luigi Cinquantini

Direttore Responsabile e Redattore  
Leĝe Respondeca Direktoro kaj  
Redaktoro:  
Pier Luigi CINQUANTINI  
via Dante Alighieri, 2, I-01010 Blera  
tel.0761 479 503 - revuo@esperanto.it  
\*\*\*\*\*

Amministrazione - Administrejo:  
FEI - Via Villoresi, 38 - I 20143 Milano  
tel/fax 02 5810 0857 - fei@esperanto.it  
http://www.esperanto.it  
C.F.80095770014  
\*\*\*\*\*

C. C. Postali - Poŝtkontoj:  
C.C. postale FEI: n.37312204  
IBAN: IT9400760101600000037312204  
C. C. postale FEI libri (per l'acquisto di libri): n.54614524  
IBAN: IT11K0760101600000054614524  
\*\*\*\*\*

C. C. Bancario - Bankkonto:  
Banca Intesa - S.Paolo, Ag.002 Milano  
IBAN: IT06A03069094460000003625562 -  
BIC:BCITITMM432  
Conto UEA - UEA-Konto: iefa-p  
\*\*\*\*\*

Comitato Esecutivo FEI - IEF-Plenuma  
Komitato:  
Renato CORSETTI, presidente  
Aldo GRASSINI, vicepresidente  
Laura BRAZZABENI, segretario generale  
Riccardo PINORI, cassiere  
Ranieri CLERICI  
Pino LALLI  
Brunetto CASINI  
\*\*\*\*\*

Pubblicazione riservata agli Associati.  
Quote associative 2010 (comprehensive di  
€ 10 dell'abbonamento alla rivista, per  
tutti gli associati tranne gli Associati  
Familiari)  
Associato ordinario € 28,00  
Associato sostenitore € 84,00  
Associato garante € 280,00  
Associato fino a 25 anni € 14,00  
Associato familiare € 14,00  
Iscrizioni presso i gruppi locali oppure  
direttamente presso l'amministrazione  
FEI.  
\*\*\*\*\*

La Gioventù Esperantista Italiana (IEJ) è  
la sezione giovanile della FEI e ne fanno  
parte gli Associati fino all'età di 30 anni.  
La IEJ cura la redazione della rubrica  
"Nova Sento" che compare in questa  
rivista.  
\*\*\*\*\*

Registrazione al Tribunale di Milano n.85  
del 27 febbraio 1970.  
Stampa: Tipografia Agnesotti - Str.  
Tuscanese km 1,700 - 01100 Viterbo -  
Tel.0761 251 025  
Progetto grafico - Grafika ideo  
Federica Ursig - Davide Amadei  
\*\*\*\*\*

In copertina: Il cantante Niccolò Fabi, tra i  
premiati del Zamenhof

# PREMIOJ

## Pretigu pacon, se vi volas pacon!

Renato Corsetti

Mi jam vidis kelkajn ceremoniojn de la vespera transdonado de skulptaĵo al la gajnintoj de la premio Zamenhof, kies oficiala nomo estas "Voĉoj de paco", en Ankona. Do, mi ne atendis grandajn novaĵojn en la vespero de la 18-a de novembro en la

eksperimenta teatro

"Licio Arena". Kaj

tamen mi eraris!

La unua afero, kiu

kaptegis la spektantojn,

estis la muzika prezento

de la infanoj de loka

elementa lernejo, kiuj

svingis balonojn kaj

kantis en bona

Esperanto, danke al la

zorga instruado de

Daniela Bottegoni. La

unua kanto estis "Certe

venkos ni" en versio

adaptita al la paco. La

dua eĉ pli vigla estis

"Nella vecchia fattoria"

(En malnova bieno nia,

ia, ia, ia ho). Ĉi tiu

"malnova bieno nia"

estis por mi la pinto de

la vespero.

Sed post tio okazis

ankaŭ la serioza

programo. La unua

statueto estis trandonita al

monaĥino, Fratino Maria Pia el

Rekanati, misiistino de la societo

de Patrino Tereza el Kolkato,

nuntempe respondeculino de la

societo por la centra kaj norda

Italujo.

En ĉi tiu okazo oni emfazis ĉefe

la karitatan laboron en Italujo

rilate al malriĉuloj kaj

enmigrintoj kaj laŭ la plej bonaj

tradicioj Fratino Maria Pia

asertis, ke tute ne temas pri

meritoj de ŝi aŭ de aliaj

monaĥinoj, sed pri faroj de dio,

kiu igas homojn donaci kaj



Monaĥino Maria Pia da Recanati

volontuli por helpi bezonantojn.

La dua statueto estis akceptita de

profesoro Rocco Altieri,

instruanta Teorion kaj praktikon

de Neperforto en la universitato

de Pizo. Li ricevis la premion pro

sia longdaŭra agado por

enkonduki la temojn de paco kaj

neperforto en la universitatajn

programojn. Li sukcesis starigi la

unuan magistriĝan kurson pri

"Pac-sciencoj: internacia

kunlaborado kaj transformado de

konfliktoj" en la universitato de

Pizo, kiun multaj instancoj

klopodas daŭre fermi. Kiel li

diris: "Oni devas ŝpari,

kaj do oni ne havas

monon por paco sed jes

por aĉeti daŭre pli

novajn armilojn". Li

faris relative longan

paroladon pri ĉi tiuj

temoj kaj li diris la plej

belan frazon de la

vespero: Se vi volas

pacon, vi devas pretigi

pacon! Finfine oni

kuraĝu ŝanĝi la

malnovan devizon de la

antikva Romo kaj oni

komprene, ke nur se oni

mem aktive agas por

paco, paco havas

malgrandan ŝancon

alveni.

Niccolò Fabi, konata

itala kantisto, estis la

plej "spektakla" inter la

premiitoj. Li kutimas

esti sur scenejoj. Liaj

meritoj rilate al ĉi tiu

premio konsistas en lia agado por

helpi suferantojn en Afriko kaj

tute aparte infanojn. Li daŭre

realigas muzikajn spektaklojn por

kolekti monon por konstrui

lernejojn (20 lernejoj estis

konstruitaj en Sudano) kaj

malsanulejojn (infan-kuraca



malsanulejo estas konstruata en Angolo).

La premio konsistis el la verko de Floriano Ippoliti "La Vojaĝisto - Il Viaggiatore", bronza skulptaĵo, kiu simbolas la homan deziron transiri la spacon kaj la tempon. En la sama vespero estis transdonita ankaŭ la premio Stoppoloni, kies oficiala nomo estas "La maleblaj integriĝoj" kaj kiu iras al homoj kaj asocioj, kiuj realigis kontraŭflujajn (do, laŭtakse maleblajn) agadojn. Ĉi-jare ricevis la premion la asocio INsensINverso (=enmaladirekto), kiu de la jaro 2006-a laboras en la roma kvartalo Magliana por integri la plurajn etnajn grupojn ĉeestantajn en nia ĉefurbo. Prezintis sin sur la podio kelkaj junaj enmigrintoj el pluraj mondopartoj, kiuj rakontis pri la kursoj de la itala kaj pri aliaj

sociaj agadoj de la asocio, kiu ankaŭ mastrumas kursojn pri devenlingvoj de la enmigrintoj al la itala loĝantaro.

La vespero, kiel kutime, finiĝas per muziko. Ĉi-foje per fortepiana koncerto de Marco Vergini per muzikaj pecoj de Debussy, Schumann, Chopin kaj Liszt.

Oni ne povas paroli pri la premio Zamenhof kaj ne paroli pri Aldo Grassini, kiu estas la elpensinto kaj realiginto de ĝi dum multaj jaroj. Aldo eble estas naivulo. Li legis en la poemo "La espero" dum la unua leciono pri Esperanto, ke "ne al glavo sangon soifanta, ĝi la homan tiras familion" kaj li vere kredis, ke esperantistoj okupiĝas pri paco sen seoj kaj sen sedoj. Malgraŭ la seniluziigoj tra la jardekoj, li ankoraŭ estas konvinkita pri tio,

La asocio Insensoinverso dum la premiado

kaj eble li ne komprenas, kiel la premiita profesoro Altieri, kiel povas esti ke nun la milita agado de la itala armeo en fremdaj landoj ricevas la nomon "pac-batalo".

Pro sia konateco en Ankono li sukcesas ne nur trovi lokajn financajn subtenantojn sed li ankaŭ envolas ĉiujn lokajn instancojn. La urbestro kaj pluraj skabenoj de la urbo kaj de la provinco ĉeestis. Sed ĉefe la granda miraklo estas ke Aldo sukcesas altiri plurajn centojn da ankonanoj (ĉi-foje ŝajne temis pri 450), kiuj ne volas foresti de ĉi tiu evento.

Ĉu finfine paco estas pli populara ol oni imagas kaj Aldo pravas?



# PIONIERI

## Incontro di studio su Bicknell

Ermigi Rodari

L'Istituto Internazionale di Studi Liguri, in accordo con l'Assessorato alla Cultura ed alla Federazione Esperantista Italiana ha organizzato, il 23 e il 24 ottobre, in occasione del centenario della FEI, un incontro finalizzato a ricordare l'attività esperantista di

Clarence Bicknell, matematico, scienziato, naturalista, archeologo e fondatore del museo omonimo per raccogliere le sue collezioni botaniche e di reperti archeologici. Cofondatore del Circolo Esperantista Milanese, fondò pure il locale gruppo esperantista.

Hanno aperto il programma l'intervento di saluto e di augurio della vicesindaco Borelli e poi quello molto più ampio e celebrativo della responsabile dell'Istituto, dott.ssa Gandolfi, mentre il dott. Corsetti, che fungeva da coordinatore, meglio

focalizzava l'iniziativa ed i temi, ricamando su Bicknell e l'esperanto. Ha poi preso la parola il prof. Pennacchietti che, con uno stile piacevole e scorrevole, si è soffermato su numerosi aspetti storici e ambientali dell'esperanto, con particolare attenzione alla

attività di quell'eccellente scienziato che, convinto assertore dei suoi ideali, all'esperanto si è dedicato con impegno, anche come traduttore, accademico, ecc. Alla fine la prof.ssa Elisabetta Vilisics ha tenuto una specie di minilezione didattica per

illustrare ai presenti non esperantisti, coinvolgendoli, gli elementi basilari della lingua, sia grammaticali che lessicali. Un ricco rinfresco in giardino ha concluso un programma che gli organizzatori hanno curato con molto impegno e capacità e che ha avuto un



Momento della presentazione della direttrice dell'Istituto Internazionale di Studi Liguri

Liguria e al NordItalia, non trascurando quelli tecnici e linguistici. A seguire la dott.ssa Daniela Gandolfi ha letto la relazione del prof. Andrea Capano, impossibilitato a partecipare, su "Clarence Bicknell esperantista", documentando questa altra

ottimo e piacevole seguito l'indomani, quando i partecipanti sono stati accompagnati su per la Valle Roya fino ai 1600 metri di Casterino per visitare la casa costruita da Bicknell per essere vicino alla Valle delle Meraviglie ed al monte Bego,



La casa costruita da Bicknell a Casterino per essere più vicino alle incisioni rupestri del Monte Bego

luogo delle sue ricerche sulle millenarie incisioni rupestri. Una bella casa dell'epoca, semplice ma spaziosa, tutta dipinta con motivi floreali da

Bicknell stesso, insieme a proverbi o aforismi da lui scritti in esperanto (altri ne decorano le imposte delle finestre), e arredata con gusto, secondo lo

stile dell'epoca. Una sorpresa molto interessante, come pure il Museo nella vicina Tenda, bella cittadina alpina con un ben conservato e notevole centro storico ed una bella cattedrale con portale in ardesia, raggiunta nel primo pomeriggio. Il museo, oltre ad illustrare l'evoluzione della Terra e della vita umana, e vari aspetti etnografici, è un'importante raccolta di originali e calchi di molte incisioni rupestri tra le 40.000 scoperte nell'area sacra del monte Bego, specialmente dal nostro scienziato. Una manifestazione ben realizzata che meritava un'attenzione ancora maggiore: gli assenti hanno pure mancato un'ottima opportunità.

#### DATI E FATTI SULL'ESPERANTO



Ampia e dettagliata descrizione dei traguardi culturali raggiunti dalla comunità di lingua esperanto in tutto il mondo e delle strutture organizzative ed operative che questa si è data, con particolare riferimento alla situazione in Italia.

Il volume, ispirato al suo precursore Dati e Fatti, si presenta in una veste rinnovata e con una introduzione alle problematiche linguistiche degli organismi internazionali ed alle possibili soluzioni che si possono prospettare.

Per capire il messaggio di questo libro occorre fare riferimento a quanto dice il presidente R. Corsetti nella prefazione "...Questo libro prova a presentare solo fatti ed i fatti sono difficili da combattere. Quello che chiediamo al lettore è solo di prendere coscienza di questi fatti e poi di decidere sapendo quello che c'è da sapere sull'esperanto..."

Si comprende così quale sia l'utilità di questo testo per informare persone interessate a conoscere cosa è stato realizzato attraverso l'esperanto e il ruolo che esso ha nel mondo di oggi.

**L'Esperanto oggi - A cura di G. Licciardello**

Federazione Esperantista Italiana - Milano

I SBN: 978-88-96582-01-5, 21 cm. - 112 pag.

1 copia € 6,00 / 4 copie € 12,00

# MEMORE

## Kunveno pri Giorgio Canuto

Julia Sigmond - Filippo Franceschi

Hodiaŭ ni - Julia Sigmond kaj Filippo Franceschi - partoprenis en Parma - en "Aula dei Cavalieri" de la centra Universitata Palaco - tre valoran kaj interesan kunvenon. Temis pri manifestacio okaze de la 50-jara datreveno de la forpaso de prof. Giorgio Canuto (1897-1960). La evento estis organizita de la Parma Universitato pro iniciato de ties docento pri lingvistiko prof. Davide Astori. Ĉeestis kvindek da personoj, plejparte E-parolantoj, alvenintaj de tuta Italio.

Sendube la plurfaceta figuro de prof. Canuto meritis tioman intereson: li estis eminenta sciencisto, internacie renoma, en la fako de la jurmedicino, kiun li praktikis kaj instruis dum jardekoj; li estis docento kaj rektoro de la Parma Universitato; ekde 1925 li ekinteresiĝis pri Esperanto kaj intense agadis kiel organizisto kaj instruisto: ekde 1928 gvidanto de IEF, ekde 1956 prezidanto de UEA; li estis aktiva rotariano kaj agadis por interkonigi kaj proksimigi la Esperantistan kaj rotarian mediojn. Krom tio, li estis humanisma, malavara homo, dotita per korelverŝa kaj humoroza karaktero kiu igis lin tre simpatia al ĉiuj, kiuj lin ekkonis. Ne senkaŭze UEA kreis, je lia memoro kaj honoro, la FONDAĴON CANUTO, kiu helpas membrigi en UEA homojn kun transpagaj malfacilaĵoj. Mi mem (Julia) estas unu el tiuj feliĉuloj, kiuj estimoplene kaj dankeme klinas la kapon antaŭ lia memoro.

Ĉe la podio pluraj universitataj docentoj bele prilumigis la figuron de Canuto laŭ la diversaj facetoj: la Parmaj fakultestroj de Literaturo, Filozofio, Klasika kaj Mezepoka Filologio (prof. R. Greci kaj G.G. Biondi); Fremdaj Lingvoj kaj Literaturoj (prof. G. Michelini); Jurmedicino (G. Masotti); Rotarianoj (prof. A. Mangia); Lingvistiko (prof. D. Astori); Esperanta kulturo (prof. R. Corsetti). Kompreneble ĉiujn prelegojn, en perfekta itala lingvo, mi (Julia) povis nur duone kompreni danke al la bonvola samtempa traduko fare de mia edzo (mi estas ŝvitpene studanta la belan italan lingvon por mi ege malfacilan: ve la gramatika genro, ve la neregulaj verboj, ve la bizaĵoj de la "inkoativoj", ktp ktp ...!)

Sekvis la transdono de la Doktoriĝ-premio por la plej valora doktora disertacio pri "Interlingvistiko kaj Esperantologio" al la simpatia junulo Pierfrancesco Naccarato. Por sia doktoriĝ-ekzameno li prezentis la tezon: "L'esperanto: la storia, la comunità, le problematiche, la lingua" ("Esperanto: ĝiaj historio, komunumo, problemaroj, lingvo"). Interese: tiu junulo tute ne estis "esperantisto" laŭ la komuna signifo de la vorto. Li tutsimple prenis Esperanton kiel studobjekton. Tamen, sekve de sia scienca esploro, li nun flue parolas Esperante ... Tipa pruvo pri la "danĝera sorĉpovo" de nia mirinda lingvo (laŭ Filippo)!

Kiel hungara Esperanta parolantino, mi (Julia) ege ŝatis la tre serioze, tre lerte organizitan eventon, tiom pli konstatante la kontribuon de tiom multaj italaj universitataj docentoj. Tiusence tre plaĉis al mi la interveno de Prof. Corsetti, kiu lerte substrekis la fakton, ke Esperanto estas akiranta ĉiam pli da atento kaj prestiĝo en intelektaj, altnivelaj, universitataj medioj.

Kiel pupistino kaj pantomimistino dum 25 jaroj - tial bone konanta la sekretojn de la parol- kaj korp-lingvaĵoj - mi (Julia) ege admiris la oratoran arton de Fabrizio Pennacchietti, kiu tre instrue parolis pri Interlingvistiko, kaj de Carlo Minnaja, kiu laste parolis ofertante al la ensorĉita aŭdantaro, per perfektaj lingvo kaj mimiko, la rakonton de la longaj intimaj rilatoj inter sia familio kaj Giorgio Canuto. Danke al tiu magia prelegeto la memorigato elstaris antaŭ ni ĉiuj kvazaŭ vivanta, aminda amiko! Tion povas atingi nur la oratora arto, kiel perfekte klarigite de Ivo Lapenna en "Retoriko"!

Post tia bela sperto - por mi (Julia) 99-procente pozitiva - mi tamen ne silentu pri unu mia eta tristeco. Laŭ mi Giorgio Canuto meritis, ke dum tiu memoriga manifestacio oni aŭdigu - se ne per unu prelegeto, almenaŭ per unu modesta frazeto - la sonon de tiu lingvo, kiu estis por li unu el la ĉefaj vivpasioj! Tio mankis, tion mi bedaŭras.

# INFORM@DIKO

## E-ludoj

Daniele Binaghi

Laŭ Vikipedio, "ludoj estas homa agado por amuziĝo en kiu unu aŭ pli da partoprenantoj sekvas aron da reguloj, normale kontraŭ aliaj ludantoj, en konkurso". Laŭ ni, pli simple, ludoj estas io, kio helpas pasigi iom da tempo amuziĝante, solaj aŭ kun geamikoj. Interreto estas unu el la medioj per kiuj ludoj pli facile disvastiĝas, kaj certe donas eblecon kunludi kun homoj, kiuj loĝas ege for de ni. Do, ĉi-foje ni vizitos ludejojn kaj ludujojn, esperante ke la malstreĉa paŭzo ne forprenos vian atenton de la aliaj pli ravaj sekcioj de tiu ĉi revuo...

### Komence, iom da teorio...

Dankaj al la reta enciklopedio, ni komencu per ĝi: ĉe <http://eo.wikipedia.org/wiki/Portalo:Ludoj> oni trovas simplan tamen utilan enkondukon al la luda mondo. Precipe, en ĝi troveblas priskriboj kaj kelkfoje instrukcioj pri multtipaj ludoj, de tre antikvaj kiel Goo kaj Mankalo ĝis la plej modernaj videoludoj.

### ...kaj, poste, multe da praktiko

Ĉe <http://brainking.com/> eblas ludi popularajn tabulludojn kun ĉiu ajn en la mondo; la paĝaro subtenas grandan diversecon de klasikaj, modernaj kaj eĉ de uzantoj



Pacmanio, flava fantomĉasisto

inventitaj tabulludoj; la paĝaro estas multlingva, kaj eblas aktivigi la esperantan version klakante la verdan flageton ĉe la dekstra flanko de la ekrano. La rusa Miĥail Povorin, jam konata en Esperantujo kiel barda kantisto, kolektis en sia retejo ĉe <http://mpovorin.narod.ru/ludoj/ludoj.html> pli ol 70 ludoj, kun interesaj kaj foje amuzaj priskriboj - zorgu, ekzemple, pri la ludoj distingitaj per injektilo, kiuj ŝajne estas "ege dormigaj" -. Kaj multaj aliaj ludoj troveblas ĉe [http://www.pepere.org/ekbrilo-ludoj\\_25/](http://www.pepere.org/ekbrilo-ludoj_25/), kelkaj de profesiaj programistoj kaj multaj de neprofesiuloj, uzantoj de la retejo. Tiuj ĉe <http://www.ludanto.org/>, kolektitaj de György Dénes, estas pli simplaj, faritaj per Ĝavoskripto, tamen estas akompanataj de regularoj kaj, ofte, de rakontoj pri ilia historio (kelkfoje, legenda).

### Famaj ludoj

Esperantistoj famas kiel tradukistoj, do kompreneble ili esperantigis multajn famajn ludojn. Por gajni je <http://krucenigmoj.tripod.com/pendumito.htm>, ekzemple, oni devas diveni nomon de frukto elektante literojn, senerare, ĉar ĉiu eraro alproksimigos nin al morto (virtuala) per pendigo; eĉ pli interese, oni donas instrukciojn por krei sian propran pendigludon, pri ĉiu ajn argumento. La fama informadikisto Reinhard Foessmeier kreis Ŝiparestro, en kiu oni devas dronigi la ŝipojn kiujn kontraŭulo metis en sia maro; la ludo troveblas ĉe <http://www.foessmeier.name/reinhard/primi/lit/apl/sxipar/>. Damludantoj trovas "panon por siaj dentoj" ĉe [http://www.ludanto.org/pri\\_damludoj/](http://www.ludanto.org/pri_damludoj/), paĝo farita de Steve



Kiom da vortoj vi kapablos trovi?

MacGregor kaj donanta informojn pri la komunaj ĝeneralaj kaj naciaj malsamaj reguloj. Kaj ŝakistoj povos lerni la ĉinan varianton - plej vigla ol la okcidenta, kun kanonoj kaj elefantoj - ĉe <http://kisa.ca/shako/china.html>. Finfine, ni ne povus forgesi unu el la plej famaj vidludoj en la mondo, kies esperanta versio troveblas ĉe <http://sites.google.com/site/ikojba/pacmanio>: Pac-Man; bonvolu helpi la flavulon manĝi la fantomojn!

### Ludoj, kiuj instruas

Krom traduki, esperantistoj ŝatas instrui; do, ne mirigas ke multaj ludoj ekzistas por instrui aŭ ekzerciĝi esperantlingve... Litere en Esperanto, ĉe <http://esperanto.com/content/litere-en-esperanto>, defias vin trovi vortojn en kvadrato plenplena da literoj; dum <http://www012.upp.so-net.ne.jp/klivo/litertriso/> estas varianto de la fama Tetris, en kiu oni devas formi vortojn per literbrikoj kiuj falas de la supro kaj rapide amasiĝas. Dezirante ludi per anagramoj, oni povas uzi la paĝon <http://www.argilo.net/anagramoj> por krei novajn; kaj krucenigmoj facilas uzante la ilojn disponigitaj de Jan Mulder kaj Klivo ĉe

| Vico        | Ludanto | Poentoj | Tegoletoj |
|-------------|---------|---------|-----------|
| >>> Dan*    | 40      | 8       |           |
| Komputilo17 | 90      | 8       |           |

Restantaj tegoletoj: 65

Bonvenon al la skrabluludo!

>>> Komputilo17 gajnis 22 poentojn, ludante MASIV.

>>> Dan\* gajnis 40 poentojn, ludante DISIGIL.

>>> Komputilo17 gajnis 68 poentojn, ludante SOIFEMAJN.

Miksu

E, D, Ĉ, R, A, J, E, Ŭ

Cedu la vicon

Skrablo, famega internacia ludo

## Ĝavaskripta Krucenigmo

Ĉi tiu programo estas Esperanta versio de Javascript Crossword, de Jan Mulder kaj estas kopirajtita per la GNUa Ĝenerala Publika Permesilo (versio 2). Klivo adaptis ĝin.

### Krucenigmo



Kontroli Montru Solvon

#### Horizontale:

1. Akiri per mono.  ✓
2. Malsanulejo.  ✓
3. Hejmo de birdoj.  ✓

#### Vertikale:

1. Ŝtono rompis la \_\_\_\_\_ de la aŭto.
2. Eks, bo, mal ktp. estas \_\_\_\_\_.
3. Persa lando.

Kreu viajn krucenigmojn

<http://krucenigmoj.tripod.com/>.  
Amuza ludo troviĝas ĉe <http://purl.oclc.org/net/klivo/chape>  
Iludo: oni devas meti ĉapelon sur ĉiun literon kiu bezonas supersignon, elektante el vico de internaciaj ĉapeletoj. Tamen la plej bone farita ludo estas sendube Skrablo, en kiu per tegoletoj reprezentantaj literojn de diversaj valoroj estas farataj sur la tabulo vortoj, kiuj estas interligendaj kiel ĉe krucvortenigmo; eblas ĝin ludi kontraŭ aliaj homoj, kaj eĉ ekzistas

diskutlisto por la ludantoj, ĉe la retejo <http://skrablo.ikso.net/>.

### Longdaŭraj ludoj

Almenaŭ du ludoj, kiuj petas multe da tempo por esti ludataj, menciindas: <http://jcsd.tripod.com/Diplomatio/>, en kiu oni rolas unu de la egaj potencoj de Eŭropo dum 1901 ĝis 1914, intertraktante kun / mensogante al / kaŝolante / minacante / persvadante la aliajn ludantojn; do, tre bona ekzercado en la uzado de la lingvo. Kaj <http://samopiniuloj.esperanto-jeunes.org/index.php>, ege simpla ludo sed interesa ĉar temas pri kunludado kun multaj homoj: ĉiutage aperas nova vorto kaj oni devas trovi ok vortojn, kiuj rilatas al tiu vorto sed kiuj ne enhavas saman radikon.

### ...kaj, finfine, deserto

Deserto alvenas je la fino, kutime. Do, jen <http://esperanto.com/content/poma-kuko-por-halovino>, kie oni devas savi pomajn kukojn eĉ se ne plu estas Halovino; sukcesade kaj amuzan ludadon, do!

# DIRU TRI DEK TRI!

## De "kozy" naskiĝas "kozy": ne kiel Sen Rodin!

Renato Corsetti

Mia amiko Filippo Franceschi estas unu el la plej bonaj parolantoj de Esperanto, kiujn ni havas nuntempe en Italujo. Lia skribo atestas lian absolutan majstrecon de Esperanto kaj lian kutimon paroli Esperanton hejme. Pro tio mi preskaŭ volis memmortigi min, kiam mi legis lian lastan verkon "Nu, kaj do?", en kiu li elektas uzi tiom da novaj radikoj (neologismoj, en la greka), kiuj estas kutime uzataj de tiuj, kiuj volas doni al si verkistan econ.

Mi vere ne komprenas, kial li ne uzas ĉiam la normalan kaj fluan Esperanton, kiu estas por li kutima. Li ne bezonas ŝajnigi esti verkisto, ĉar li estas densa verkisto.

Ni iru laŭorde.

La plej rimarkinda nova radiko estas "koz-o". Vi divenas kion, tio signifas, ĉar vi estas italo kaj ĉiutage uzas "cosa". Se vi estus korea komencanto aŭ ĉina komencinto, vi certe almenaŭ pensus, ke eŭropanoj estas frenezaj.

La Fundamento tute klare diras: aĵo = "*quelque chose possédant une certaine qualité ou fait d'une certaine matière...*", alivorte "*una cosa che possiede una certa qualità o fatta di una*

*certa materia...*". Sekvas tiam aliaj ekzemploj: molaĵo, sekaĵo, malnovaĵo, ktp. Por traduki la italan "cosa" ekzistas ankaŭ alia vorto en la Fundamento: afero = *affaire* | *affair* | *Sache*, *Angelegenheit* | *дело* | *sprawa*.

Do, ne mankas vortoj en Esperanto. Se oni volas enkonduki ion novan, oni prefere enkonduku ĉinan aŭ japanan radikojn, sed certe ne latinidan, da kiuj ni jam havas tro multajn. Ni ne parolu pri "povr-", "old-", "-oz-", "tramp-", "tepid-" kaj "lant-", ĉiuj jam en la unua rakonto de la libro. Filippo certe ne pravigus sin per la kutima frazo "Sed ĝi ja estas en PIV!" Multaj faras tion, simple ĉar la eldoninto de PIV forgesis mencii sur la kovrilo ke PIV ne estas vortaro de Esperanto, sed de la okcidenta dialekto de Esperanto. Alia eco de la lingvaĵo en tiu libro estas la uzo de "ci" por la itala "tu". Zamenhof mem en la Fundamento skribis, ke ..... Esence ne ekzistas en la normala Esperanto la kontrasto inter "tu" kaj "voi". Enkonduki ĝin ŝajnas al mi provo iom malsimpligi Esperanton. Ĉu ni vere volas tion?

El la unua rakonto de la sama libro mi tamen prenas kelkajn

ekzemplojn de tradukoj de tipaj italaĵoj, pri kiuj oni povas diskuti.

"*Terno secco*", ekzemple, certe ne estas *secco* en la senco de "tute sen akvo". Verŝajne la senco estas "Triopo neta/preciza". Se poste la "neta triopo" estas gajnita en la "*ruota di Firenze*", oni devas multe cerbumi por komprenigi pri kio temas al nia mongola leganto. Laŭ iuj vortaroj temas pri la turniĝanta lotumilo, kiun oni uzis por lotumi la numerojn, el kiuj ekzistis unu en ĉiu lotum-urbo. Do, eble "*terno secco sulla ruota di Firenze*" estus "preciza triopo en la lot-urbo Florenco". Kaj tamen oni devus eble aldoni piednoton.

Alia bela ekzemplo estas tiu de la "ruĝaj togoj". Neniu neitalo povas pensi pri kio temas. Eble oni pensas pri antikaj loĝantoj de Romo, kiuj pro aparta situacio surhavis togojn ruĝkolorajn. Ke tio signifas "komunismaj juĝistoj" devas esti iel klarigata en la teksto.

Konklude, kara Sen Rodin, mi bedaŭras ke mi prenis vian verkon kiel ekzemplon, sed temas pri la verko, kiun mi plej atente legis lastatempe.

# KULTURO

## Historio de E-Muziko (3)

Floréal Martorell  
reviziita de Daniele Binaghi

*Floréal «Flo» Martorell, nia muzika ĉiĉerono, daŭrigas sian rakonton pri la historio de muziko en Esperantujo.*

### Tria parto: en la nova jarmilo

Kiel ni povis jam vidi en la unuaj partoj de nia vojaĝo, Esperanto-rok-kulturo disvolviĝis plene en la 90-aj jaroj kun eksplodo de plej diversaj artistoj kaj bandoj. La eko de tiu dua jarmilo anoncas vere abundan kaj riĉoplenan muzikan periodon por Esperanto kaj el plej diversaj flankoj sentiĝas la muzika bolado... kiu premenpuŝas supren plurnombrecon da artistoj, da stiloj kaj ankaŭ kvaliton de ilia arto kaj eldonoj. En 5 jaroj aperis preskaŭ tiom da muzikproduktaĵoj kiom estis aperintaj en la 10 pasintaj jaroj! Kaj, paradokse, tiu eksplodo okazas ĝuste, kiam ekaperas krizo en la muzika mondo kaj en la muzika distribuado (disfalo de la vendoj en la muzika merkato pro ekonomia krizo kaj eksplodo de interreto kiu disponigas elŝuteblan muzikon senpagan). Ni spektis en la jaro 2000 la aperon de la du lastaj diskoj de Kolekto 2000, eldonita de

Vinilkosmo, kun la disko “*Kia viv*” de **Kore**, franca bando kun la elstara kantisto **Kris Spitzer**, kaj la unua disko “*Lingvo Intermonda*” de **Dolchamar** elektronika pop hip-hopa bando el Finnlando.

La projekto de subgrunda muziko lanĉita antaŭ unu jaro aperas en la jaro 2000, plenumita dank’al la kunlaboro inter la brazila eldonejo La Blua Papilio kaj Vinilkosmo. La kompilo “*Esperanto subgrunde*” prezentas 31 titolojn de 15 diversaj bandoj punkaj kaj hardkoraj el Brazilo, Francio, Kanado kaj Ukrainio. Estis eĉ kunorganizita subgrunda festivalo en okupita ejo en Tuluzo por inaŭguri la aperon de la disko. Koncertis tie la tuluzaj bandoj kaj por la okazo venis el Brazilo **Julio Calegari**, unu el la respondeculoj de La Blua Papilio kaj basisto de la bandoj **Araukana** kaj **Averto al gepatroj**.

Sekvas aliaj novaj bandoj, kiuj ankaŭ eldonas siajn unuajn diskojn: “*Sojle de la klara temp*” de la barcelona popoltradicia bando **Kaj Tiel Plu**, kiu impresis la publikon okaze de la Universala Kongreso en Montpellier en 1998, kaj

“*Brokantaĵoj*” de **Esperanto Desperado**, fondita el la kuniĝo de la dano kaj eks-Amplifikiano **Kim Henriksen** kaj de la bosno **Amir**.

Kulmino en 2000 por Esperanto-muziko estis riĉoplenaj festivaloj, okazintaj **KAFE** en julio en Tuluzo (Okcitanio / suda Francio) kaj **KEF** en Aŭgusto en Helsinko (Finnlando). Tiuj du festivaloj donis la tonon kaj malfermis perspektivojn por la nova jarmilo...

Alia grava evento por Esperanto-muziko okazinta en junio 2001 estis la malfermo de la surbendigstudio de Vinilkosmo kiu donis la eblecon al la diskeldonejo eki propran produktadon.

Inaŭguris la studion la loka esperanta artisto **JoMo** per la



Ĵomart kaj Nataŝa, kazaĥa paro

surbendigo de la albumo “*JoMo friponas!*”; ĝi ankaŭ estis la preteksto por fari pompan inaŭguron kun invito de la lokaj esperantistoj, kiuj partoprenis en la registrado de pluraj titoloj (eĉ la infanoj kantis sub la gvido de **JoMo**).

Kelkajn monatojn poste, en la sama jaro, la fama franca artisto **Morice Benin** surbendigis en la studio de Vinilkosmo la albumon “*In-Spir*”; temas pri elektitaj kaj tradukitaj kantoj komponitaj de la artisto mem kiujn li kantis papage. Sed ne nur ĉe Vinilkosmo disvolviĝas projektoj: en 2001 en Brazilo, la Brazila Esperanto-Ligo eldonas diskon “*Verdestelaj brazilanoj*” de la nordorienta brazilana kantisto el Fortalezo **Tarcizo Lima**, en Rusio naskiĝas dank’ al la gvido de **Garik Kokolja** kaj produktita de REU la rusa kolekto “*Oraj kantoj*” kun la apero de la du unuaj volumoj “*Ni renkontiĝos*” kaj “*Amata lando*”. Estas aparte grave iom paroli pri tiu kolekto, ĉar la projekto estis tre originale lanĉita, kaj multajn rusojn povos tion atesti: estis lanĉita en la tuta lando enketo kaj baloto por ke ĉiuj esperantistoj en Rusio elektu la kantojn, kiujn ili ŝatus enmeti en tiun kolekton; gajnis tiuj famaj tendaraj kantoj el la sovetunia epoko.

Ŝajnas ke la elekto fariĝis ege sukcesa kaj vasta, ĉar la kolekto–projekto anonciĝis vere ampleksa kun 6 antaŭviditaj volumoj plenumitaj de la plej elstaraj aktualaj rusaj artistoj (gemuzikistoj, gekantistoj kaj bardoj).

En Francio, la **Bretona Esperanto-Koruso**, kiu naskiĝis dank’ al la esperantaj regionaj kursaroj kies pinto estas la



Ono Takao, la japana muzikisto

somera staĝo de Pluezec, eldonis “*Meven*” sian duan diskon sub la gvido de **Franjo Provost** kaj de **Manjo Clopeau**.

**Tjeri Faverial**, eksmembro de **La Kompanoj**, memeldonas propran diskon “*Duone*”, surbendigitan en lia hejmsstudio. En Hispanio el Malago **Solotronik** (la avangarda elektronika soloartisto) memeldonas tutan kolekton da albumoj sur KD (memfarita laboro); temas pri reeldono de albumoj aperintaj sur kasedoj “*Vulkano*”, “*Miraklo*” kaj “*Astral Egoency*” kaj pri du kompiloj, la unua prezentanta malnovajn muzikojn aperintaj sur vinilo kaj surkasedo “*Kompilaĵo 1990 – 1995*”, la dua neeldonitajn kaj remiksitaĵojn titolojn “*Kompilaĵo 1997 – 2001*”. Li ankaŭ eldonas novan albumon “*Iniciadogalileo*”.

**Persone** de kelkaj jaroj prezentis du tipojn de spektakloj, montrante la du vizaĝojn de la bando, nome la elektran kaj la akustikan. En 2002 finfine la bando eldonis ĉe Vinilkosmo la albumon “*Sen*”, do preskaŭ senelektra albumo, plenumita per akustikaj instrumentoj. En tiu jaro naskiĝas en Brazilo la unua volumo de Brazila kolekto, “*Tom Jobim en Esperanto*” produktita de **Flavio Fonseca** kun la kontribuo ankaŭ de **Alejandro Cossavella** el

Argentino, kantisto-gitaristo de la rokbando **La Porkoj**. Tiu albumo malfermas kolekton kiu celas prezenti kantojn tradukitajn en Esperanto de famaj brazilaj artistoj (Tom Jobim, Caetano Veloso, Chico Buarque, Milton Nascimento, Gilberto Gil, ktp.).

Tuj post tiu albumo aperas ĉe BEL alia albumo de **Flavio Fonseca**, kiu kantas tekstojn verkitajn de **Geraldo Matos** (prezidanto de la Akademio de Esperanto); temas pri la albumo “*Simbiozo*”.

Ankaŭ la brazilana **Dj Roĝer** el Sao Paulo aperigas memeldonitan KD-on “*Muziko Elektronika*” kun propraj kaj tradukitaj kantoj de aktualaj elektronikaj muzikoj. Sekvas la apero en Rusio de la 3a volumo de la kolekto Oraj Kantoj, “*La lingvo por ni*”, kaj nova disko de la bardo **Mikaelo Bronŝtejn**, memeldonita: “*Esperantujo mia*”.

El Hungario eldonita de LF-Koop aperas la unua KD de **Anjo Amika**, “*Bela revo*” kiu miksas varieciajn kaj ŝlagrajn kantojn al pli religiaj. En Germanio **Denis Rock Tamba**, afrikano de la ex-bando Afrika Espero, eldonis la kvintitolitan solo albumon surkasede “*Afrika Nokto*”.

El Novzelando aperas nova artisto, **Daphne Lawless**, kun du titoloj sur ŝia dua KD eldonita ĉe eldonejo Random Static Release. Fine de 2002 aperis la “*Elektronika Kompilo*” eldonita de Vinilkosmo post longega preparado... sed la oficiala apero estis anoncita en 2003... fakte la projekto naskiĝis dank’ al la renkonto de **Gunnar Fisher** kaj **Flo** dum KEF 2000 en Helsinko. Gunnar fariĝis la arta reĝisoro de tiu projekto de kompilo de



muzikoj elektronikaj el plej diversaj landoj kaj tendenco (elektropopo, tekno, haŭzo, trencio, denco, drumenbaso kaj bigbito). En tiu disko aperis la plej avangardaj artistoj kaj Dĵ-oj de la epoko (**Solotronik**, **Lunatiko**, **Dolchamar**, **Andreas Viklund**, **Dĵ Kunar**, **Magnus**, **Dĵ Roĝer**, **Asorti**, **MHZ** kaj **Krio de Morto**).

2003 estas denove abunda jaro kaj alportas el diversaj landoj diversajn muzikproduktaĵojn. En Germanio el Hamburgo **Ralph Glomp** starigas propran diskeldonejon Nigra Kato kaj eldonas du diskojn "*Jus per kares*" kaj "*Dum kristnaska tempo*", laŭ lia ŝatata stilo popŝlagra.

**Nargis Mondjazib**, profesia uzbeko kantistino, studis muzikon en la muzika lernejo de Samarkand; nun ŝi studas en Usono, sed intertempe ŝi jam komencis belan muzikan karieron kaj havis okazon koncerti en diversaj landoj (Kirgizio, Kazahio, Taĝikio, Hindio kaj Eŭropo). En februaro de la jaro 2003 **Nargis** eldonis du oktitolajn kodiskojn ("*Protect Love*", "*The Water of Life*") en kiuj aperas po du Esperanto-kantoj ("*Piano en la nokto*", "*Nia instruisto*", "*Tuko*", "*Somera mondo*", ĉi lasta de Ĵomart); ceteraj kantoj estas en la persa, uzbeko, rusa, taĝika, ktp..

El Pollando, **Pendumito**, anarkipunkkora bando de **Lukaso Wrobel**, memeldonis 6 titolan Kdon kun 2 titoloj en Esperanto ("*Volupt' de l' dekadenco*", "*Eterna vivo*"). El Japanio venas la "*Kompilaĵo*" de **La Mevo** sur KD, kiu enhavas la 3 albumoj de **La Mevo** aperintaj sur kasedo ("*La Nomkarto*" de 1986, "*Bluo*" de

1991, "*Vizaĝoj*" de 1993) kaj la remiksita titolo "*Flava blankul*", aperinta en la unua volumo de "*Vinilkosmo-Kompil*" en 1995.

El Rusio aperas la du sekvaj volumoj de la kolekto Orakantoj, "*El malproksima helo*" kaj "*Mia nomo de gravas*" (tiu ĉi lasta prezentas nur kantojn de **Mikaelo Bronŝtejn**), same kiel la nova disko de **Ĵomart kaj Nataŝa**, "*Amu min*" kaj de **Elena Puĥova**, "*Akceptu, Mondo, nin amike!*".



Martin Wiese, jam kantisto de Persone, ankaŭ soloalbumis

La fino de la jaro alportas por la kristnaskaj festoj ankaŭ la duan diskon memeldonitan de la nederlanda korusa sepopo **Akordo**: la albumon *Kristnaska kordo*.

2004 estas unu el la plej produktivaj jaroj, ĉefe por Vinilkosmo: estis produktitaj kaj surbendigitaj en ĝia studio la albumo "*Civilizacio*", de **Strika Tango**, la nova bando de **Alejandro Cossavella** el Argentino. La disko estis frukto de intensa internacia kunlaborado ebligita dank'al la evoluo de la modernaj komunikrimedoj, nome Interreto kaj radio. Parto de la disko estis registrita en Buenos Aires kaj parto en Donneville kaj partoprenis en la surbendigo

argentinaj muzikistoj, francaj kaj norvega. Estis tre forta sperto. La diskon eblis eldoni rapide dank'al interreto kiu donis la eblon al la argentinanoj sekvi la faritan laboron tra la elsendoj en Tuluzo ĉe radio Suda Kanalo, arkivitaj de la radioarkivejo de **Scott Redd** en Nebrasko. Tio tute ne estintus pensebla 10 jarojn antaŭe!

Sekvis la dua albumo de **Esperanto Desperado**, "*Hotel Desperado*", kiu ankaŭ estis granda aventuro: ĝi estis surbendigita en 3 aŭ 4 diversaj studioj en Kopenhago kaj ankaŭ parto de unu kanto por la voĉo de **JoMo** en Donneville kaj por tiu de **Martin Wiese** en Stokholmo...

Alia albumo kies surbendigo okazis en la studio de Vinilkosmo en 2003 aperis nur en 2004 pro atendo de la permesoj por 5 kantoj de famaj artistoj el Francio kaj Kanado, temas pri la albumo de **Ĵak Le Puil**, "*Mi estas*" en kiu partoprenis ankaŭ **JoMo** kiel muzikisto (basgitaro, gitaro, piano, perkutitoj kaj aliaj instrumentoj).

La tuta bando **Kaj Tiel Plu** dum 3 semajnoj instaligis en Donneville por la surbendigo de ilia dua albumo "*Plaĉas al mi*" kaj vere estis ege plaĉa aventuro, unua semajno okazis en marto 2004 kaj la du restantaj en aŭgusto, tio aspektis kvazaŭ kataluna tendaro, kun ĉio, la muziko kaj la etoso... ankaŭ ne forgesbla sperto!

Fine la lasta albumo eldonita de Vinilkosmo fine de la jaro 2004, sed kiu "aperis oficiale" en la tuta komenco de 2005, estas tiu de **Dolchamar**, "*Rebela sono*". Kompreneble ne nur Vinilkosmo eldonis Kdojn en 2004! En Germanio la nova afrika

bando de **Denis Rock Tamba**, **La Rolls**, memeldonas albumon “*Sunradio*”, **Ralph Glomp** novan albumon “*Nokto iĝas tag*” kaj **Jürgen Wulff** la senstreĉigan muzik-albumon “*La lumpiramido*”, ĉiuj por la eldonejo Nigra Kato.

**Kaj Stridel**, kiu ludas en ĵaz-Esperanto triopo en Svedio, eldonas la Kdon “*Jazsperanto*”. En Francio **Tjeri Faverial** eldonas sian duan albumon “*La ŝosoĝo de l’utopi*”, kaj la bretona koruso **Meven** eldonas novan albumon pri maraj kantoj el la tuta mondo: “*Ondumoj tra la mond*”.

El Frislando (Nederlando) **Kajto** eldonas la 5an albumon “*Lokomotivo, rulu nun!*”; en Rio de Janeiro nova kantistino, **Vera Jordan**, aperigas “*Esperanta voĉo*” kun kantoj verkitaj de **Sylla Chaves**; kaj en Ukrainio aperas la unua volumo “*Ukrainiaj kantoj*” de la ĥora ensemblo Espero el Ukrainio sub la gvido de **Mikaelo Linecki**. En 2005 post la apero de la disko “*Rebelas sono*”, Vinilkosmo enstudiiĝas **JoMo** por nova album- projekto kun **Liberecanoj** kaj la orienteŭropmuziktradicia bando **Solnička**, kiu dum pluraj monatoj de laboro produktas 24 titolan albumon “*jOmO slavumas*”, aperinta komence de la jaro 2006.

Alia projekto, kiu jam ekis antaŭ 3 jaroj, finfine aperas post somero 2006; temas pri albumo de la brazila bando **SUPERNOVA**, la unua KD ekstra eldonita de Vinilkosmo entenanta krom la 13 kantititolojn, “*Pasio en katen*”, unua videoklipo realigita profesie de brazila eldonejo Kosmuzik.

La somero 2006 kulturevente

riĉas kaj ĉefe la nova orientiĝo de FESTO, kiu iom post iom transformiĝas en festivalo kun la kunlaboro de EUROKKA por eble transpreni la torĉon de KAFE. FESTO 2006 revelaciis novajn talentojn en Francio kun **La Pafklik**, pariza hiphopa bando, **FAMo**, kiu prezentis sian unua memproduktitan KD, kaj la sud-orient franca duopo de mondmuziko **Duoble Unu**, kiu tiam mem ekpensis produkti kaj eldoni sian albumon “*Sen lim’ ĝis...*”, kiu fine aperis preskaŭ nur 2 jarojn poste en marto 2008!

Dum aŭtuno 2006 **Garik Kokolija** en Rusio helpas en la eldono de la diskoj de **Mikaelo Bronštejn**, “*Printempo Blujinsa*”, kaj de **Mikaelo Povorin**, “*Verula sezono*” kaj “*Revula sezono*”.

En Stockholmo **Karina**, la filino de **Ĵomart kaj Nataša**, registras kaj eldonas kun akompano de siaj gepatroj limigitan kvanton de propra albumeto “*Karina kantas por vi en Esperanto*” okaze de la renkontoj IJF kaj UK (ambaŭ en Italio) kaj NR en Germanio.

Fine de 2006, **Martin Wiese de Persone** venas en la studion de Vinilkosmo por finregistri kaj miksi sian unuan soloalbumo “*Pli ol nenio*” (en kiu akompanas lin **La Talpoj**, el Stockholmo). La disko aperas en februaro 2007 kaj estas prezentita en lanĉefesto la 22an de marto 2007 en la kafejo Mazzika en Aspudden (Stockholmo).

En februaro 2007, **Kore** venas en la studio Vinilkosmo por registri la voĉojn de sia dua disko kaj revenis por miksi ĝin fine de majo... la albumo “*Tielas vivo*” aperas meze de julio 2007 kaj estas prezentita oficiale en

FESTO 2007, kvankam **Kore** ne ludis tie kaj estis anstataŭigita de la **Frankfurta Inicialoj DC**, kiu estis ĵus eldoninta la okcentimentran Kdisketon 5 titolan “*OK*”.

Samtempe kiel la apero de la disko de **KORE** Vinilkosmo ekdistribuis la diskon de la nova sveda bando el Härnösand **La Perdita Generacio**, kiu eldonis sian unuan veran albumon “*Eksenlime*” fine de 2006.

Komence de majo 2007, **Jacques Yvart** enstudiiĝis por 15 tagoj ĉe Vinilkosmo por surbendigi sian 26an diskon kaj duan albumon en Esperanto “*Invito por vojaĝo*”... komence de septembro 2007 li revenis por finregistri voĉojn kaj miksi, dum 12 pliaj tagoj, ĵus antaŭ lia turneo en Usono kaj Kanado. La albumo aperis fine de februaro 2008, sed la lanĉo de la disko estis prokrastita pro grava korooperacio de Jacques... oficiala apero de la disko okazis dum la disko-lanĉofesto en Dunkirko organizita de la Dunkirka Esperanto-klubo kune kun la kulturaj servoj de la urbodomo kaj Vinilkosmo la 19a de aprilo 2008.

En Majo 2008 **La Perdita Generacio** kaj Vinilkosmo lanĉas kunproduktan projekton por la dua albumo de la Sveda bando; post longega laboro kaj matrafo de la KEFeto okazinta la



Jacques Yvart kantis esperantigitajn famaĵojn de Brassens

12an de julio en Kopenhago finfine la disko “*Eksplodigos vian domon*” aperis la 5an de septembro por la Oranĝa Renkontiĝo (Oro) en Hernusando (norda Svedio) kaj sekve por pli internacia prezento ARKONES en Poznano, septembre 2008.

Vinilkosmo jam de pli ol unu jaro laboras ankaŭ pri la projekto de “*Hiphopa kompilo*” kaj jam alvenis plurajn interesajn kontribuojn de artistoj kiuj repas Esperante, ekzemple **Eterne Rima** el Pollando, **La Pafklik**, **Marteno Minich** el Slovakio, **Dolchamar** el Finnlando, **DĴ Roĝer** kaj **Antonio Moreira (TONE)** el Brazilo, **La Zinfonia** el Ĉilio, **DĴ Kunar** el Germanio, **Arĝenta nubo** el Suda Koreio, **Musubana** el Norvegio.

Afrikan artistoj siaflanke ankaŭ provas per siaj rimedoj partopreni en la kultura vivo de Esperanto kiel ekzemple **Denis Rock Tamba** de la eks **Rolls** post reveno al Kongo post sia forpeliĝo el Germanio; sed ankaŭ estas **Vigla Muziko**, **Théophile Mayoma-Diankembo**, **Rovema Amevor**; ankaŭ la talenta **Zhou Mack** el Kongo, post multaj malfacilaj spertoj kaj travivaĵoj, sukcesis finfine starigi propran bandon **Zhou Mack & la Fabo**.

#### Lastatempe

**Stefano Keller** el Studo Pro en Svislando jam kunlabore kun artistoj el Madagaskaro (**Ligilo**) kaj Maŭriciaj Insuloj (**Mariĵan'**, **Nigra por la vivo**) sukcesis registri videofilmetojn de tiu mondoparto.

En Italio (Bologna) la akapela ensemble **Blue Penguin** eldonis diskon kun tre sepciala interpretado de “*La Espero*”, mirigante la kongresistojn de

UK en Florenco en 2006.

Flanke de Vinilkosmo estas pluraj projektoj en atendo... Mi jam parolis antaŭe pri la hiphopa kompil projekto, sed ankaŭ estas alia projekto pri **Metala kompilo**; jam pluraj bandoj laboras por partopreni la projekton kaj ni jam ricevis proponojn de **Alejandro Cossavella** de **La Porkoj** el

Argentino kun muziko de **Araŝ** el Francio, **Valanja** el Brazilo, **Azaŭak** el Normandio... Pluraj artistoj jam faris demojn kaj iam emus eldoni albumon, inter ili citendas la hiphopa bando **Eterne Rima** el Pollando, loĝanta nun en Japanio, **Inicialoj DC** de la franco loĝanta en Germanio **Eric Languillat**, **Lunatiko** denco/erembio el Pollando, **Krio de Morto** el Pollando, **Ĵomart & Nataŝa**, **Morice Benin** kun projekto de albumo de kantoj de Léo Ferré, **Duobla Unu** el Francio per sia mondmuziko, **Flavio Fonseca** el Brazilo, ktp... Vere, ne mankas projektoj...

Kaj, sendepende kaj margene de eldonejoj, pluraj amatoraj artistoj helpe de la aktualaj teknikaj rimedoj per komputiloj aŭ alimaniere sukcesas fari relative kvalitajn registraĵojn, ili faras provojn kiel **Kader Benchelef** el pariza regiono en Francio, **Borje Lund** eksmembro de **Amplifiki** el Svedio, **Christian Declerck** el Antwerpen en Belgio. Aliaj preparas demojn, kiel la finna bando **Manifesto Jukebox** kaj **MHZ** el Argentino. Ankaŭ aliaj disponigas siajn muzikojn en interreto en siaj personaj TTTpaĝoj kiel **Flaschen Inna** **Plastiktüte** el Germanio, **Herr Purpur & KC** kaj **Radikulo** ambaŭ el Usono, **Carlos Devizia** el Argentino. Aliaj eldonas en

limigitaj kvantoj Kdojn aŭ kasedojn proprakoste aŭ helpe de asocioj: **Ĵ.Dan' & Bert Schumann** el Bretonio/Francio kun la Kdoj “*Nune Futuren*” kaj “*Destino tero*”, **Natalja Kazimova** blinda kantistino el Taĝikio, **Espero** ensemble el Tiĥvin en Rusio kun la KD “*Blanka nokto*”, kaj **Kantoturdo (Jean-Pierre Charrier)** el

Nantes (Francio) kiu realigis albumon pri Ĵulo Vernes. Kaj fine aliaj provas sian arton sursceneje.... kiel la skandalemaj **VVĈP-oj (La Verd-Varm-Ĉili-Piproj)** el Francio, la **Kuracistoj** el Germanio aŭ **Natalja** el Kaliningrado laŭ instigo de **Aleksander de Lode**, kiu koncertis inter alie en Arkones kaj Luma festivalo en Finnlando.

Kelkaj Dĵ-oj ankaŭ remiksas muzikojn de aliaj artistoj, foje kun permeso, foje ne... kiel **DĴ Roĝer'** kun titoloj de **Ĵomart & Nataŝa** aŭ **Persone**...

Nuntempe la esperanta vivo kaj kulturo ĉiam pli ampleksigxas en la interreto kaj ne eblas plu neglekti tiun aspekton de Esperanto-kulturo. Kaj kompreneble ankaŭ multaj Esperanto-artistoj tie aperas kaj disaŭdigas siajn muzikojn kaj ankaŭ muzikvideojn ĉu en propraj retejoj, ĉu en tiel nomataj sociaj retejoj kiaj Ipernity, Myspace, Facebook, aŭ ankaŭ en Blogpost, Youtube, Last FM, ktp...

# Agotago a Milano e Bologna



Le prime due foto in alto si riferiscono a Milano, le restanti a Bologna

## Memorie di un esperantista

Renato Corsetti

Angelo Barisani è socio della FEI da 25 anni ed è un personaggio straordinario, uno di quelli su cui Fellini avrebbe fatto volentieri un film. Abita a Mezzano, frazione di Ravenna, che si trova a nord di Ravenna, al confine con il comune di Bagnacavallo, sulla destra del fiume Lamone.

Ha avuto una intensa attività esperantista e più in generale nella vita culturale di Mezzano, che adesso documenta in un libro dal titolo "Quasi un isolotto esperantista a Mezzano – Memorie di un nonagenario".

Il libro di 176 pagine è una miniera di fatti e di foto relativi alla storia del movimento esperantista non solo a Mezzano e Ravenna ma anche in Emilia-Romagna.

Suppongo che il nostro socio, al quale vanno i più sentiti auguri della FEI, generalmente regali il libro agli interessati. Infatti nel libro non c'è alcuna indicazione di casa editrice o di prezzo. Chi fosse interessato scriva direttamente all'autore: Angelo Barisani, Via Barisani 19 - 48123 Mezzano (RA).

## Sukceso de Esperanto dum Lucca-Comics & Games 2010

Daniele Binaghi

Ankaŭ ĉi-jare esperantistoj partoprenis la grandegan komiksan foiron "Lucca Comics & Games", en la bela Toskania urbo Lucca. Budo estis aranĝita kiel kutime en la "Korto de la Svisoj", dank' al la aktiva helpo de la lokaj samideanoj kaj de volontuloj el aliaj regionoj. Multaj homoj, plejparte junaj, vizitis la budon kaj ricevis informojn pri esperanto kaj la bildstria esperanta mondo: estis prezentitaj la tri komiksojn ĝis nun eldonitaj de projekto RoMEo (Rat-Man, Diabolik kaj Lupo Alberto); kaj vendrede ĉeestis ankaŭ Andrea "Grillo" Grillenzoni, la aŭtoro de unu speciala desegnaĵo pri Lupo Alberto kaj de ĉiuj humuraj bildoj, kiuj aperas en la revuo "L'esperanto", por subskribi ĵusaĉetitajn ekzemplerojn de la komiksoj.

Speciala kunlaboro estis farita kun la "Rat-Man Fans Club", al kies anoj estis donita parto de la buda spaco por bonfara vendado de kalendaroj desegnitaj de Leonardo Ortolani; la enspezo, pli ol 2000 eŭroj, estos donacita al asocio "Changamano ONLUS", en kiu jam multaj italaj esperantistoj aktivas.

## Grava incendio en Bona Espero

Ampleksa incendio detruis grandan parton de la teritorio de Bona Espero, esperantista orfejo en Brazilo. La granda grundofajro trafis la regionon en la tria semajno de septembro, sed ne atingis la ĉefajn konstruaĵojn de Bona Espero. En letero sendita al subtenantoj de la projekto, la esperantistaj estroj de la orfejo, Giuseppe kaj Ursula Grattapaglia, rakontas pri la okazaĵo: "... Ni saviĝis el grandega fajro, kiu alvenis fortege nokte de la nordo. Se estus dumtage, oni pli sekure povus batali kontraŭ la flamoj, sed nokte ĉiuj bestoj, ĉefe la serpentoj fuĝas de la fajro rekte al la homoj, kiuj volas kontraŭbatali... Tamen ni sukcesis defendi niajn domojn kaj legomejojn. Ĉe la lago ĉio estas nigra, kaj eĉ brulis la elektra drato kaj iom da tuboj...."

Dum la nokto la laborantoj kune kun la infanoj provis haltigi la fajron ĉe vojo, por savi la konstruaĵojn: "... Feliĉe ni sukcesis. Sed 90% de la tuta teritorio de Bona Espero, inkluzive de ĉiuj najbaraj grundoj brulis, kaj la fajro ĝis nun ne haltis. Ĝi nun devoras la parkon, kiun oni provas defendi per du malgrandaj aviadiloj, sed ne sukcesas. Ĉio brulas...."

La prezidanto de UEA, Probal Dasgupta, en mesaĝo sendita al la retpoŝta listo de UEA-membroj alvokis ĉiujn laŭeble doni financan subtenon al Bona Espero, por ripari la damaĝojn.

- Mi skribas al tiu ĉi listo kun la espero, ke iuj el vi - kiuj jam konas la projekton Bona Espero kaj scias pri ĝia profunda valoro por la bonfarto de Esperanto kiel ideo en la reala mondo kaj pri la ŝvito de sindonaj homoj el la tuta esperantista mondo konstruinta kaj savtenanta tiun ĉi unikan kunlaborejon - tuj faros financajn aŭ aliajn materiajn kontribuojn, se vi ne jam proponis aŭ sendis ion al Ursula, Giuseppe kaj ilia granda familio.

[el Ret-Info]

# LETTEROJ

## Congresso di Lignano

### Non tutte rose e fiori

Filippo Zanoner

C'ero anch'io tra i numerosi samideani convenuti a Lignano. Il Congresso è stato certamente tra i migliori, nonostante qualche imprevisto nel programma, peraltro denso di proposte e a tutti gradito. Le osservazioni che sto per fare non riguardano quindi le scelte degli organizzatori e la loro gravosa attività - di questo noi tutti siamo loro riconoscenti - ma solo il pessimo trattamento che la Getur ha riservato ai propri ospiti ed il corrispettivo preteso.

Cominciamo da quest'ultimo. In base al tariffario, il costo giornaliero a persona, in camera a due letti con pensione completa, dal 22 agosto al 5 settembre era di 42 euro per alcuni residence e di 48 euro per altri. Io ho pagato 57 euro e mezzo al giorno, che diventano 60,50 con il posteggio. Solitamente a gruppi di 40-50 persone viene concesso un notevole sconto, tanto che, mediamente, al prezzo di 50 euro o poco più si può alloggiare in moltissimi alberghi a 3-4 stelle di rinomate località turistiche ed in piena stagione. Ma lasciamo stare. Non mi aspettavo certo il lusso, ed anzi avrei molto apprezzato la massima sobrietà e semplicità, a condizione di trovare un ambiente abbastanza confortevole e servizi efficienti.

Niente di tutto questo. In quella che doveva essere una camera con due letti erano collocate quattro brande, fortunatamente fornite di materasso, cuscino e lenzuola. Non un tavolino, non una sedia.

L'impianto dell'aria condizionata non funzionava. Poco male: la temperatura notturna superava di poco i 27 gradi. La biancheria da bagno era costituita da un solo asciugamano, molto simile ad uno strofinaccio.

Il... rancio si poteva consumare con il sistema self service su tavole senza tovaglie in un capannone distante qualche centinaio di metri dal... dormitorio, dopo aver fatto la fila e consegnato l'apposito buono. Si potevano scegliere due delle quattro pietanze proposte, ossia individuare le meno peggiori. I cibi erano fatti con prodotti di infima qualità e destinati al riciclo. Senza alcun sovrapprezzo si poteva bere, in bicchieri di plastica, acqua di rubinetto contenuta in bottiglie aperte. A pagamento si potevano ottenere altre bevande,




ma recandosi in altro locale, il bar, sempre affollatissimo, e perciò dopo ulteriore lunga attesa.

Tralascio altri particolari. Aggiungo solo che la chiave della camera mi è stata consegnata dopo avere aspettato circa un'ora (dalle 12 alle 13, non di notte) e che gli addetti alla reception non sono stati in grado di darmi indicazioni circa i locali mezzi di trasporto e di navigazione lagunare.

Basta così, acqua passata. Una sola considerazione. Se il prezzo normalmente praticato è stato aumentato per l'uso dei locali congressuali, trovo assolutamente ingiusto che tale maggiorazione sia rimasta a carico esclusivo di chi ha fruito del servizio alberghiero, se così si può definire l'indecoso trattamento che abbiamo ricevuto.

Nessuno ha protestato? Nemmeno io. Tutti eravamo presi da interessi più elevati, coinvolti nelle attività ed iniziative del congresso. Tuttavia la FEI deve essere ben consapevole di aver concluso con la Getur un cattivo affare (per usare un eufemismo) e porre la massima attenzione a non concluderne di simili in futuro.



# RECENZOJ

## Tradukita literaturo

### *Oni skribas "Maremo" oni legas "Orlandini"* Renato Corsetti

Esperanto ne estas elparolata laŭ la skribo, fakte oni skribas "Maremo" kaj oni legas "Orlandini". Ne diru kun ĝemo: "Sufiĉas! Mi ne plu volas aŭdi pri Maremo. Irante al Pisa, mi evitos Groseton kaj rondiros tra Abruco! Orlandini-n danku la urbestro de Groseto, sed la sama urbestro pagu al ni kompenson, ktp."

Fakte, kiel mi jam diris en alia artikolo, ni bezonus 10, 100 kaj eĉ 1000 Orlandin-ojn en Italujo, por konigi al la mondo la belaĵojn de niaj regionoj kaj ĉefe por transdoni al la mondo la sentojn de italoj pri siaj urboj kaj regionoj. Eksterlandanoj ne komprenas, kial homo naskiĝinta en malgranda vilaĝo sur la montoj, ekzemple Capranica nel Sannio, dum la tuta vivo restas ligita al ĝi, kaj, eĉ loĝante en Parizo, strebas per ĉiuj fortoj reveni al ĝi, kaj kverelas kun la pariza edzino, kiu preferas morti pli ol loĝi en Capranica nel Sannio. Estas strangaj ĉi tiuj eklsterlandanoj! Nun nur Orlandini portas la flagon de ĉi tiu literatura kampo. En la lastaj jaroj li eldonadis, sialabore kaj siakoste, tutan serion de verkoj, en kiu li kolektis ĉion kolekteblan pri Maremo. En la lasta libro "Maremo – Literatura rigardo tra la suda Toskana Maremo – Dua parto, Milano: Excogita Editore" li superas sin mem. Li kolektis, ordigis kaj tradukis la verkojn pri Maremo de 15 verkistoj, kaj provizis ilin per notoj tiel ampleksaj, ke mi mem lernis multon ankaŭ pri homoj kiel Garibaldi, Cavour, ktp. Lia celo estas doni al eksterlanda leganto la mankantajn fonajn informojn, sed fakte li faras multon plian. La libron ornamas paĝoj kaj paĝoj da fotoj blanka-nigraj kaj koloraj, kiuj prezentas ĉiujn, vere ĉiujn vidindajn monumentojn kaj bildojn de la civilizoj florintaj tie, de la etruska ĝis nun.

La eldonejo ĉi-foje estas ne-esperantista eldonejo, posedata de la fratino de la groseta verkisto Luciano Bianciardi, el kiu estis tradukitaj du libroj, kaj do ankaŭ teĥnike la libro estas senmakula. Mendu ĝin ĉe Itala Esperanto-Federacio. Ĝi kostas nur 19 eŭrojn, kio estas nenio kompare kun la riĉega enhavo.



**Pier Vittorio Orlandini**  
*Maremo*  
Milano 2010  
Excogita  
300 paĝoj, 21 cm  
19.00 €  
ISBN 9788896678145



# iej nova sento

## SPAZIO GIOVANE PER I GIOVANI

<http://iej.esperanto.it>

Kiam homo ne plu  
malvarmas, malsatas  
kaj timas, ĝi estas  
malkontenta  
Ennio Flaiano

## IJF 2011 a Pornassio (IM)

Hai programmi per Pasqua 2011? Nooo? E allora prenota subito un posto in prima fila allo IJF 2011, il raduno esperantista più bello che ci sia!

Il Festival Giovanile Internazionale 2011 si terrà a Pornassio, in provincia di Imperia. Il paese si situa all'estremo lembo della Valle Arroscia, mirabile punto di incontro tra due ambienti: quello mediterraneo, nella parte più a Sud del territorio e quello alpino a Nord, al confine con il Piemonte. La sede del festival si trova infatti a 900 metri di quota, nella frazione Colle di Nava, ma dista solamente 30 km dal mare!

Dal 20 al 26 aprile 2011 oltre cento

giovani esperantisti, italiani e stranieri, si incontreranno per



discutere del tema "Generazioni in viaggio", ma anche per praticare la lingua, fare amicizia e divertirsi, in un contesto giovanile e internazionale. Il programma sarà

ricco di interessanti contributi, conferenze, discussioni, lavori di gruppo, giochi, concerti, gite e molto altro!

Come da tradizione, fino a notte fonda funzioneranno il bar, la discoteca e la gufujo (una specialissima sala da tè, per chi ama chiacchierare con tranquillità con i propri nuovi amici). Ma soprattutto, niente è obbligatorio: ognuno decide liberamente come gestire il proprio tempo. Tieniti informato, consultando il sito <http://iej.esperanto.it/ijf/2011/index.php>, sul quale troverai anche i costi e il modulo di iscrizione. Ti aspettiamo!

## Di esperanto in esperanto

Massimo Ripani

Umberto Eco, scrivendo *La ricerca della lingua perfetta nella cultura europea* ha riconosciuto che l'esperanto "è costruito con intelligenza. Linguisticamente segue veramente criteri di economia e di efficacia". Questi stessi principi caratterizzano "Di Esperanto in Esperanto", l'ultimo libro del ventiseienne Giuseppe Macrì, che in poco più di 100 pagine offre una panoramica non solo del fenomeno linguistico, ma anche dei suoi aspetti sociali e culturali.

Sicuramente l'opera del giovane scrittore e giornalista si limita a

tratteggiare argomenti come la letteratura e tace altri, ad esempio la storia moderna del movimento, ma il risultato è un libro sostanzialmente ben proporzionato e di facile lettura. L'autore, infatti, non ha preteso di aver dato alle stampe la più completa opera di esperantologia ma, con uno stile chiaro e deciso, ha fornito un "album fotografico" dell'Esperanto ieri ed oggi. Un fine che ha richiesto necessariamente scelte e rinunce, anche coraggiose, ma comunque necessarie.

Analizzando l'indice è facile osservare che il libro nasce da una

tesi di laurea e ne conserva, ad esempio, la tradizionale partizione. L'opera non ha, tuttavia, "peccati originali" da scontare: Macrì è sempre concreto nella sua prosa e si mantiene sempre lontano da sterili dispute accademiche. Purtroppo in Italia le tesi di laurea hanno una vita brevissima e spesso finiscono dimenticate in uffici o biblioteche e non resta che complimentarci con questo giovane scrittore per aver creduto ed aver dato alle stampe il proprio studio.

# Du novuloj al PSKK

Andrea Resta

La Post Somera Klaĉkunveno okazis pasintoktobre en la kampara gastejo "De Spreedonken", ĉirkaŭata de frosta kaj verdega arbaro inter la urbetoj Olmen kaj Balen, ne malproksime de Antwerpeno. La geknaboj de FLEJA, Flandra Esperantista Junulara Asocio, kaj la simpatiega kuireja teamo, Niki kaj Gerd, prizorgis por ke ĉio estu senmanka dum la tuta semajnfino, de la 15a ĝis la 17a de oktobro.

Kvankam ni eklernis la internacian lingvon de malmultaj monatoj, kaj ni ne ankoraŭ kapablis konversacii Esperante, mia amikino Elisa kaj mi forte emis partopreni tian renkontiĝon, ĉar post la unua studado pri la necesaj gramatikaĵoj kaj la unuaj kontaktoj kun la lokaj italaj esperantistoj ni vere deziris travivi la internacian interkonatiĝon kaj amikecon per neŭtrala lingvo. Tio estas la aspekto kiu plej fascinas nin pri Esperantismo, kaj ni sentis ke,

sen rekta sperto, niaj opinioj pri Esperantio riskis iĝi tro malkonkretaj kaj plenaj de antaŭjuĝoj. Ni estas tre kontentaj pri nia decido! Dum partopreni en pli granda kaj grava kunveno povus esti pli entuziasmige, ĝui interkonatiĝante la partoprenantojn kaj vere klopodi (kaj kia peno!) uzi la lingvon estas laŭ mi pli facile dum tiel eta, simpla renkontiĝo. Entute ni estis nur kvardeko da aliĝintoj: gejunuloj, familioj kaj infanoj, kiuj alvenis ĉefe el Belgio kaj Nederlando, sed ankaŭ el Francio, Germanio, Rusio kaj Norvegio. Kiel indikas la nomo mem, la kunveno precipe temis pri senstreĉa babilado kaj simplaj ludoj. Kion pli oni bezonas? La plej grava programero estis la duontaga ekskurso per bicikloj al diversaj vidindaĵoj en la ĉirkaŭaĵoj, sed dum la semajnfino oni povis elekti inter multaj okupoj, kiel baznivela kurso de Esperanto, folkloro kundancado, hispana filmo kun Esperantaj subtitoloj,

tabloludoj, prelegoj pri veganismo kaj go-ludo, ege amuza nokta kvizo, helpado por kuiri kaj purigi, vendo kaj aĉeto de libroj kaj bildstrioj, kaj tiel plu. Ĉiun nokton, kompreneble, la trinkejo funkciis kaj proponis delicajn belgajn bierojn!

Ni kore dankas ĉiujn, precipe Manuela kaj Michael Boris por la pacienco kaj la tradukoj! Kompreneble por ni PSKK estis multe pli ol eta senstreĉa renkontiĝo kaj estis granda emocio renkonti tiom da interesaj homoj, kiuj tute nature kaj egale interparolis kaj amuziĝis, kvazaŭ naciaj limoj ne estus problemo. Ankaŭ tre interese estis aŭskulti historiajn rakontojn pri Belgio kaj iujn diskutojn inter du belgaj knaboj en Esperanto. Kvankam ni komprenis neniun vorton de ili diritan, mi opinias ke, en tiel delikata politika situacio, estas jam tre grava afero ke valona kaj flandra knaboj simple sukcesis interparoli.

## NOVA SENTO

a cura  
della  
IEJ



## Redattore

Manuela Ronco  
corso Asti 151,  
12043 Canale (CN)  
Tel.3281070922  
manuchan@interfree.it


Conto Corrente Bancario  
Federazione Esperantista Italiana -  
Sezione Giovani  
IBAN:  
IT84T0306234210000000932107

## **ĈU ANKAŬ VI VOLAS IĜI DELEGITO DE UEA?**

**Se vi jam estas membro de UEA dum unu jaro  
kaj plenumas la ceterajn devojn, vi povas iĝi  
Delegito, Vicdelegito, Junulara Delegito aŭ  
faka Delegito de ĝia Delegita Reta.**

Plenigu la respondilon en la Reta Jarlibro aŭ elŝutu tiun ĉe  
🌐 [www.uea.org/asisto.html](http://www.uea.org/asisto.html), plenigu ĝin kaj sendu al via  
ĉefdelegito. *Nur* se mankas ĉefdelegito en via lando,  
sendu la plenigitan respondilon al la Centra Oficejo.

***ALIĜU AL NIA RETO!***



### Lazzaro Ludovico Zamenhof - Antologia

Carlo Minnaja  
In questa antologia l'autore ci propone una sintesi, ampia, documentata e commentata con numerose note, del pensiero di Zamenhof non limitandosi alla lingua, che pure è stata la sua


iniziativa di maggiore successo.

ISBN : 978-88-96582-00-8

Federazione Esperantista Italiana

Milano, 2009

21 cm. 304 pag. € 21,00



### Diabolik, la reĝo de la teroro

Trad. D. Binaghi & F. Zanoner  
Il progetto "Romeo" propone un nuovo fumetto di uno dei più diffusi personaggi dei fumetti italiani che è ora leggibile anche in esperanto. In

questo albo il genio del male Diabolik, si cimenta nell'episodio del suo primo album comparso nel 1960, "Il re del Terrore".

ISBN 978-88-7036-083-7

Edito da: Edistudio, Pisa 2009 – l'albo è il risultato di una collaborazione Edistudio, IEJ, FEI.

21 cm, 144 p. € 6,00




### Doktoro Esperanto

M. Migliucci  
regista: Giancarlo Fares  
monologo dell'autore ed attore Migliucci, che porta in scena la vita di Zamenhof. Liberamente tratto da "Una voce per il mondo" di V. Lamberti. DVD, durata 1 ora circa.

ISBN 978-88-7036-701-0

Edistudio, Pisa 2009 € 18,00



### Una lingua e un popolo

H. Tonkin  
Trad. E. Belluco.  
Introduzione e note di C. Minnaja


Il rapido mutare delle condizioni geopolitiche ha costretto più volte il popolo esperantista a mutare di conseguenza i suoi scopi e le proprie

strategie. Questo libro si interroga sul divenire di questi mutamenti che gli esperantisti non possono fare a meno di conoscere.

ISBN 978-88-96028-11-7

Ediz. EVA 2009

21 cm 172 p. € 16,00



### Vojoj de interlingvistiko: de Bruno Migliorini al la nuna tempo

Aktoj de la studtago en la universitato de Florenco 26a de Julio 2006a Edistudio – Pisa  
Il primo numero della rivista "Multilinguismo e Società".

Nel fascicolo sono pubblicati gli atti della giornata di studi dedicata al grande linguista italiano Bruno Migliorini, svoltasi presso l'università di Firenze il 26 luglio 2006 in occasione del congresso universale.

Edistudio, Pisa-2009 128 pag. € 15,00

(Prezzo speciale per i soci FEI 10 €, comprese le spese di spedizione)



### Cent'anni di esperanto a Trieste

AA/VV  
Racconta l'attività degli esperantisti a Trieste dal 1906, anno di fondazione del gruppo, presentando i profili dei protagonisti più autorevoli. ill. a colori.

Biblion edizioni, Milano-2009

ISBN 978-88-96177-02-0

21 cm., 280 p. € 17,50